

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 185 — Septembro 2001

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

# 86a Universala Kongreso en Zagrebo

De la 21a ĝis la 28a de julio, 2001, okazis la 86a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Kroatio. Estis tie pli ol 1660 esperantistoj el 57 landoj. Je sabato, la 21a de julio, oni akiris dokumentojn, vizitis la libroservon (granda ĉambro kun tablo post tablo amaskovritaj de libroj), kaj renkontis malnovajn amikojn ĉe la interkona vespero.

Depost la fino de la Solena Malfermo je dimanĉo, la 22a de julio, sub gvido de Prezidanto Kep Enderby (de Aŭstralio), kun saluto de la Prezidanto de la Kroata Respubliko mem, ĝis kiam nia nova Prezidento, Renato Corsetti (de Italio), oficiale fermis la kongreson je sabato, la 28a, estis tiom da samtempaj sesioj, ke oni devis ĉiam elekti kion fari kaj poste bedaŭri pri ĉio maltrafita. Kaj se oni elektis jen kaj jen nur ripozi en la koridoroj, oni konstante renkontis malnovajn amikojn el multaj landoj — tio eble estas unu el la plej valoraj trajtoj de la kongreso, almenaŭ por mi.

Mi aparte ĝuis la prelegojn de la tiel nomata “Kongresa Universitato”. Amri Wandel, astrofizikisto de Israelo, prelegis pri la projekto SETI por serĉi por inteligentuloj en la kosmo. Estis pli da ĉeestantoj ol sidlokoj, ĉar profesoro Wandel ĉiam parolas klare kaj interese kaj montras belajn bildojn (tamen, ne de eksterteranoj). Marjorie Boulton parolis ankaŭ al plenplena prelegĉambro kaj science diskutis kaj analizis la kvar librojn verkitajn de Joanne Rowling pri Harry Potter. Ŝi laŭdis la librojn pro ties literatura nivelo kaj atentokapta magio kiu sukcesoplene logas la adoleskantojn (kaj ankaŭ homojn pli kaj malpli

aĝajn) for de la televido kaj al la mondo de libroj. Grant Goodall, juna profesoro de Universitato de Teksaso en El Paso, prelegis tre interese pri lastatempe elkovrita atestaĵo, ke la kapablo de infanoj krei lingvon ne estas lernita sed estas en la homaj genoj. Oni nun opinias, ke ĉiuj infanoj, eĉ surdaj infanoj, en la komenco uzas la saman gramatikon. Prof. Maŭro La Torre, de Italio, prezentis siajn pensojn pri la ĝusta edukmodelo por la tria jarmilo. Li diskutis la malnovan problemon pri ĝenerala kontraŭ teknika edukado, kaj li ankaŭ atentigis nin, ke multaj, eĉ la plejmulto da homoj, estontece laboros en pli ol unu profesio dum la vivodaŭro kaj pro tio la lernado devos esti tutviva afero.

Interesuloj partoprenis en diskutoj pri la kongresa temo, „Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj”. Estis fakkunsidoj de matematikistoj, medicinistoj, instruistoj, SATanoj, go-ludantoj, spiritistoj, komunistoj, mondcivitanoj, kat-rondanoj, skoltoj, ĵurnalistoj, kristanoj, veteranoj, gejoj, ĵuristoj, agadantoj por Afriko, Oomoto-kredantoj, vegetaranoj, verduloj, muzikistoj, radio-aŭskultantoj, indiĝenoj, blinduloj, ktp, ktp. Okazis Ĉe-seminario, Esperantologia konferenco, koruso, oratora konkurso, aŭkcio, publikaj kunvenoj kun la Akademio, kun la Estraro de UEA kaj kun la Centra Oficejo, internaciaj ekzamenoj, terminologia forumo, Urbestra akcepto, prezento de literaturaj premioj, prelegetoj pri siaj libroj fare de verkistoj, konversaciaj rondoj kaj sesioj pri libroj de la jaro, masaĝterapio, historio de Balkano, historio de Kroatio kaj enkonduko al la kroata lingvo. Ĉu vi povas prononci „Hrvatska”?*

Estis giĉetoj kaj budoj kie oni povis lerni pri diversaj aferoj faritaj de Esperantistoj. Oni diris ke la evangelizistoj kaj la ateistoj okupis apudajn budojn dum unu posttagmezo kaj estis interesa sed tute ĝentila konversacio inter si.

En la vesperoj ankaŭ estas planitaj aktivecoj: bankedo, balo, teatraĵoj, koncertoj kaj kulturaj prezentoj, kaj kroatiaj kaj internaciaj. Ankaŭ estas dumtagaj kaj vesperaj ekskursoj kaj, kiel kutime je merkredo, la kongresejo estis fermita por liberigi la esperantistojn por partopreni en diversaj tuttagaj ekskursoj.

Ĉu vi scias, ke „McDonald's” estas internacia vorto? Ni eltrovis, ke kiam ajn ni misvojaĝis, ni devis nur enketi pri la loko de tiu manĝejo, kaj la Zagrebanoj bonkore fingromontris la ĝustan direkton. La hakbovaĵa sandviĉejo estis apud la stacidomo, de kie ni povis senprobleme trovi niajn hotelojn.

Estas interese pripensi, ke Kroatio estas malgranda lando. Estas nur 4 milionoj da enloĝantoj, kaj 750 000 el ili loĝas en Zagrebo.

Mi vizitis la malnovan (ekde almenaŭ la 11a jarcento) parton de la urbo ("Gornji Grad"), kiu situas sur monteto, ĉirkaŭita de remparoj kaj turoj , super la moderna urbo. Mi malsupren rigardis de muroj el ŝtono kaj grundo kaj penis imagi la pratempon kiam dum centoj da jaroj Zagrebo estis ĉe la rando de Kristanujo kaj frontis al la Turka Imperio tuj sude.






Mi mem vidis neniun atestaĵon de la lastatempa milito por liberigi Kroation de Jugoslavio. Tamen, unu turisto diris al mi, ke li vidis la restaĵon de tutdetruita vilaĝo. Nia ekskursogvidanto, kroato, raportis al mi, ke la serboj murdis lian propran patrinon kiam ili detruis vilaĝon en Bosnio; poste li aldonis, „Efektive, ne estis serboj — estis malbonaj homoj kiuj mortigis mian patrinon, kaj malfeliĉe malbonaj homoj troviĝas jen kaj jen inter ĉiu gento." Dum la kongreso li gastigis serban amikon en sia domo.

— Steĉjo

***Kroato klarigis al mi, ke oni prononcas (proksimume) la vorton: HrVATska (= Kroatio).**

**La 87a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto, 2002, en la urbo Fortalezo, ŝtato Cearo, en Brazilo. Tiu loko estas en nordorienta Brazilo, ĉe la atlantika marbordo kaj nur du gradoj sude de la ekvatoro. Feliĉe, la temperaturo iom mildiĝas en aŭgusto.**

# Mesaĝo de la Prezidanto de UEA

pri la teroraj atakoj en Usono

Ankoraŭ sub la ŝoko pro la katastrofo okazanta en Usono mi sentas la devon, nome de Universala Esperanto-Asocio, esprimi al la usona popolo kaj tutaparte al la usonaj esperantistoj la solidarecon de la tutmondaj esperantistoj. En la venontaj horoj eble estos pli klara la amplekso de la katastrofo kaj oni scios pli pri la kaŭzoj kaj pri la respondecoj, sed jam nun eblas diri ke la Esperanto-movado nun, kiel ĉiam, nepre rifuzas perforton kaj militon kiel rimedojn de interhoma konduto. La nuna katastrofo montras al ni, ke ni devas ankoraŭ pli intense labori por disvastigi niajn ideojn pri paco kaj dialogo inter malsamaj gentoj.

Sincerajn kondolencojn al la viktimoj kaj al iliaj parencoj kaj sinceran solidarecon al la usona popolo kaj al la usonaj esperantistoj.

Renato Corsetti,
la Prezidanto de la
Universala Esperanto-Asocio

Pro la informo ni dankas al Retinfo kaj Pola Radio, la 12an de septembro, 2001.